

4 pago!


Bulgara ESPERANTISTO

ESPERANTO

V-19479/37

(1968r.)

N. 1, 3-4, 6, 9-10



1968

1

Ĉefartikolo. 1968 — Internacia Jaro de Homaj Rajtoj (Iv. Sarafov)	1
St. Dargonov. Kion faris la verda stelo	2
* * * Normigo de geografiaj nomoj	2
Sergej Jesenin. Ŝipestro de la tero	3
Toma Ajolov. Dediĉo	3

ORGANIZA VIVO

DK de BEA. Jubileaj tagoj en Smoljan	4
DK de BEA. Mozaiko	5
Coĉo Kolarov. Agado de SES „Aleko“	7
L. Moralieva. La geesperantistoj en Sofio ekskursas	8
E. Daskalov. Renkontiĝo kun veterano S. Panĉev	8
At. Gaev. Memorinda solenaĵo	9
Javorka Ĥristova. Renkontiĝo de gestudentoj-esperantistoj	10
* * * Angla esperantistino en Varna	10
Atanas Manĉev. La festivalo en Bela Palanka	11
E. D. Gloron al Oktobro	12
G. Lazarov. E-agado en Ajtos	12
J. Zaprianov. Renkontiĝo de esperantistoj en Meriĉleri	13
* * * IV Internacia E-Ferio en Miedzygorze	13
* * * Kongreso de Unuiĝintaj urboj ĉe Unesko	13
C. K. Eksterlandaj esperantistoj gastis al ni	14
N. Nikolov. Aktiveco de la turistoj-esperansistoj en Sofio	14
* * * Окръжно за подпомагане есперантските дружества в Смолянски окръг	15
A. Vaitilavičius. IX Baltlanda E-Tendaro	16

Kovrilpaĝo: Parto de la partoprenintoj en la celebrado de la 40-jara jubileo de E-movado en la distrikto de Smoljan.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



1968 — INTERNACIA JARO DE HOMAJ RAJTOJ

En aŭgusto de la jaro 1789 la franca Konsitucia Asembleo proklamis la Deklaracion pri la Rajtoj de la Homo kaj Civitano.

En Parizo la 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis kaj proklamis la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj.

Tiu ĉi ĉarto de liberecoj kaj rajtoj konsistas el Solena Enkonduko kaj teksto de tridek artikoloj. Kvankam la teksto mem de la Deklaracio ne estas formale subdividita, tamen en ĝi estas distingeblaj tri partoj. La unua (art. 1—21) proklamas la jam klasikajn rajtojn kaj liberecojn, bazitajn ĉefe sur la principoj de la Franca Revolucio: libereco, egaleco, frateco. La dua parto (art. 22—27) difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn. La lastaj tri artikoloj formas la trian parton, kiu entenas kelkajn regulojn pri ĝiaj signifo kaj interpretado.

En 1968 en la tuta mondo estos celebrata la 20-ja datreveno de la Universala Deklaracio.

Bulgario, kiu estas membro de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de Unesko, ankoraŭ partoprenas en tiu glora celebrado. Oni aranĝas solenajn kunvenojn, radioprelegojn, pertelevidajn prelegojn, oni publikigas specialajn artikolojn kaj informojn en la gazetaro k. a.

La Universala Deklaracio havas grandan valoron ankoraŭ por la Esperanto-movado. La Internacia Lingvo estas, inter alie, esprimo de la ideo pri rasa, nacia, religia kaj lingva egaleco. Tial ĝi povas prosperi nur en kondiĉoj de efektiva respekto al esencaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de la homo. Vladimir Ilĉ Lenin, la genia organizinto kaj gvidinto de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio prave skribis: „Absolute neniajn privilegiojn al kiu ajn nacio, al kiu ajn lingvo“. (Lenin, Verkaro, IV eldono, volumo 20, paĝo 6).

Unesko invitis ĉiujn neregistarajn organizaĵojn en konsultaj rilatoj kontribui al la Jaro de la Homaj Rajtoj laŭ siaj eblecoj. La Estraro de UEA akceptis la inviton kaj decidis ke la Asocio partoprenos en la celebrado per aparta programo.

UEA antaŭvidas jenajn entreprenojn: esploroj kaj dokumentaro pri la lingva diskriminacio sur internacia kaj nacia niveloj; pritraktoj de la homaj rajtoj en unu sekcio de la 53-a UK en Madrid; almenaŭ unu prelego pri la homaj rajtoj en la programo de la Internacia Somera Universitato en Madrid; temoj pri pluraj homaj rajtoj por la Oratora konkurso en 1968; prelegoj kun diskutoj pri la homaj rajtoj dum la landaj kongresoj kaj en

la lokaj societoj; artikoloj pri la homaj rajtoj, unuavice pri la lingva diskriminacio en la internacia kaj nacia gazetaro; dua eldono de la Unversala Leĝlaracio en Esperanto; eldono de memoriga glumarko; aktiva partopreno de la reprezentantoj de UEA, de ĝiaj landaj kaj fakaj organizaĵoj, aŭ de iliaj lokaj grupoj en ĉiuj aranĝoj organizitaj de Unesko aŭ de aliaj instancoj sur internacia, nacia kaj loka niveloj.

Nur la aktiva kunlaborado de ĉiuj esperantistoj garantios plenan sukceson de tiu vasta programo. Nur tiamaniere E-movado povas efike kontribui al ĝenerala programo de la homaj rajtoj en la mondo kaj samtempe fortiki la poziciojn de la Internacia Lingvo inkluzive ĝian pli vastan aplikon. Ĉar estas bone sciite, ke ne ĉiuj proklamitaj rajtoj kaj liberecoj estis ĉiam kaj ĉie observataj. Eĉ tro ofte ili ankoraŭ estas piedpremitaj de la imperialismaj ŝtatoj kaj reakciaj reĝimoj, pro kio estas ege necesa lukto en monda skalo por garantii al la homaro la vivnecesajn rajtojn: libereco, egaleco, frateco, feliĉo, laboro, paco.

KION FARIS LA VERDA STELO

Ofte nia vilaĝo Râjevo Konare, distrikto de Plovdiv, estas vizitata de alilandanoj. Sur mia brusto ĉiam brilas E-stelo kaj mi persiste ĉirkaŭrigardas serĉante inter ili esperantistojn.

Renkonti esperantistojn en la vilaĝo estas rara afero.

Je la 22-a de oktobro grupo de germanoj—25 personoj: agronomoj, veterinaraj kuracistoj, inĝenieroj kaj aliaj agrikulturagantoj alvenis en nian vilaĝon por viziti la tre faman agrikulturan laborkooperativon „Georgi Dimitrov“.

Inter la renkontintoj-gastigintoj estis ankaŭ mi, kompreneble kun la verda stelo sur la brusto. Subite al mi alpaŝis belstatura junulo kaj ekparolis flue en Esperanto. Elŝprucis tuj ĝojego! Sekvis vigla konversacio.

Paralele kun la oficiala tradukinto la esperantisto D-ro Werner Exner faciligis la konversacion inter gastoj kaj gastigintoj.

La partia sekretario Ivan Dermenski kaj la prezidanto de la agrikultura

laborkooperativo Peni Titov, kiuj iam lernis Esperanton, denove ekinteresiĝis pri Esperanto.

Je la vespermango en la restoracio, kie vice kun la germanaj gastoj sidis 9 polaj gastoj, kiuj ankaŭ vizitis la kooperativon, k menciĝis toaŝtoj.

Mi profitis la okazon je tiu „internacia forumo“ kaj en la toaŝto mi emfazis: „Vera interŝango de sperto, kaj plena interkono kaj amikiĝo povas veni kiam ni senpere parolas unu al la alia. La facila internacia lingvo Esperanto donas tiun eblecon.“

Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto.

Poste je la nomo de la germana agrikultura kooperativo „Friedrich Engels“ la esperantisto D-ro W. Exner invitis kelkajn membrojn de la estraro de nia kooperativo en 1968 viziti GDR.

La invito estis akceptita elkore.

St. Darĝonov

Prezidanto de la Kontrola Komitato de Agrikultura Laborkooperativo en Râjevo Konare

NORMIGO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ

Elstaraj kartografoj kaj lingvistoj el 128 landoj kunvenis de la 4-a ĝis la 22-a de septembro 1967 en Ĝenevo por konferenco organizita de Unuiĝintaj Nacioj por unue igo de geografiaj nomoj. Ili pristudis, kiamaniere

malpliigi la nun regantan konfuzon, kiun kaŭzas la neegala uzado internacia kaj eĉ nacia rilate nomojn de urboj, riveroj, montoj k. s. (Laŭ Unesko Features kaj Informa Servo de UEA).



ŜIPESTRO DE LA TERO

de *Sergej Jesenin*

Ankoraŭ ja
neniu gvidis Mondon,
kaj ni neniam kantis.
Sole li,
la manon etendinte en Estonton,
la mondon nomis
unu famili'.
Min ne konvinkas
la frapad' tambura,
pri la hero' —
de odoj elokvent'.
Feliĉa estas mi,
ke dum epok' obskura
kun li mi spiris
per la sama sent'.
Ne sole ni,
al kiuj ĉio estas —
apuda
miras fora elefant',
ke iĝis li —
Simbirska knab' modesta
ĉe l' direktilo
de la granda land'.
Kaj en la onda uragano
kaj fera
kaj tre milda li
meditis multe,
Ĉar marksano,
kaj, ĉar ja Lenin,
kreis pli kaj pli.
Apenaŭ li
en sago kaj en volo
ĉektuŝis radon
de la direktil', —
la ŝipo-tero
tuj laŭ vera vojo

navigis,
tranĉis ondojn mil kaj mil.
La direktanto
kaj ŝipestro: li!
Kun li
ne timas homoj
nur pro tio,
ke iĝis jam marista famili'
diverslandanoj
kune
en partio.
Ne timu,
nekonanto pri la mar',
ĉar atinginte kontinenton
ili
fajrigas jam
por la homar'
vojlumon,
ne ĉesantan brili.
Kaj bardo
de alia sort',
ne mi
sed inter vi poeto
al la batalo
per la nova vort'
la gloron kantos
kun impeto.
Li diros:
„Estas novigant'
nur li,
la homo
de anim' hardita,
trovinta vojon
al la nova land',
de aliuloj ne vidita“.

Tradukis: *K. Gusev* (Moskvo)

DEDIĈO

de *Toma Ajolov*

Al Dimitr Malĉev — Plovdiv

Al Dimitro Malĉev — pionir' malnova
ĉi-modestan kanton kore mi dediĉas.
Veterano flama de temp' Zamenhofa,
li persistis verve ĉiam fruktoriĉe.

Redaktor' iama de „Kulturo“, „Semo“
kaj de l' ĉiutaga fama „Telegramo“,
sur posten' li staris kun ĝoj' ofereme—
al ide' fordonis li eĉ sian amon.

En labor' kaj ago multajn vivojarojn
li vicigis are en la verda rondo,
por ke ardu plue en anim' la fajro
de la stelo paca ankaŭ en estonto.

Antaŭ ni elstaras la nobla figuro
per orden' merite digne dekorita,
laŭ propono justa danke de „Kulturo“
kaj de l' Respubliko fare aprobita!

JUBILEAJ TAGOJ EN SMOLJAN

Denove estas aŭtuno. Ĝia oreca vualo kovris la deklivojn de Kajnadina, Kar-lâk kaj Karamanga — zorgemaj protektantoj de la rodopa belulino — Smoljan. Ŝi alportis ankaŭ ion novan por la esperantistoj de Meza Rodopimontaro — duonjarcenta jubileo de la Granda Oktobro kaj 40-jara datreveno de la esperantista movado en tiu regiono.


Per la duobla festo la verdstelanoj en urboj kaj vilaĝoj organizis specialajn kunvenojn kun elstaraj lektoroj de Sofio, Varna k. a. Impona ornamo, ĉiutagaj disaŭdigoj per la lokaj radioretoj, radio Plovdiv, interese aranĝitaj distrikta kaj lokaj gazetoj antaŭdiris pri grandaj E-solenaĵoj. Kaj ili ne malfruis.

La unuaranga restoracio „Rodopi“ estis malgranda enteni la esperantistojn el la urbo, distrikto kaj la lando, venintaj kundividi pensojn kaj emociojn. La konvena ornamo, la muziko kaj la mallonga programo kreis kondiĉojn por agrabla amuziĝo. La eksterordinara intimeco, la komunaj libere kantitaj esperantaj kantoj, la dancoj lasos neforgeblajn rememorojn en ĉiuj. Ili inspiris por novaj sukcesoj en la nobla E-afero.

La dimanĉa oktobra mateno de la 15-a de oktobro kolektis ĉiujn denove en la komforta salono de la sindikatoj por la jubilea solena celebrado.

La melodias E-kanto kaj belsona parolado, plenumitaj de la kantista grupo ĉe la societo — kaptis kaj varmis multajn esperantajn korojn. Nepriskribeblan emocion provokis la kora bondeziro de la plej malgrandaj esperantistoj, eldiritaj varme de la kandidat-junpioniro Petr Pavlov.

La jubilea solenaĵo estis malfermita de Jordan Jordanov, prezidanto de Dis-



Ĥoro de gestudentoj en Smoljan

trikta E-komitato. En la prezidantaro okupis lokojn: la prezidanto de CK de BEA Nikola Aleksiev, reprezentanto de DK de BKP kaj Distrikta Popola Konsilantaro Stoil Sedjankov, la elstaraj E-instruantoj kaj gvidantoj de kursoj en Pamporovo — Kunĉo Vâlev kaj docento Georgi Dimov, reprezentanto de BEJ Jordan Angelov, la prezidanto de la turista sekcio „Esperanto“ en Sofio Nikola Nikolov, gastoj el najbaraj distriktoj kaj la fondintoj de la societo en Smoljan: Petr Pamporov, Rajĉo Daskalov, Vasil Dafinski, Nikola Uzunov, Georgi Kenov, Kalin Tošev kaj Boris Dorkov.

En sia prelego Jordan Jordanov rakontis pri la kreiĝo kaj disvolviĝo de la E-movado en la distrikto.

Li emfazis ke la esperantistoj de la meza parto de Rodopimontaro kontribuis por la venkoj de la ideoj de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, inter kiuj brilas la nomoj de eminentaj personoj el la regiono de Rodopimontaro — la nacia heroo, la famiginta kolonelo Diĉo Petrov, la partizana estro

Bratan Ŝukerov, la poeto-partizano Kiril Maĝarov k. a.

Ĝojige estas, ke la preparado de la jubileo kontribuis por la aktivigo de la esperantistoj en la urbo kaj distrikto kaj por atingo de bonaj sukcesoj — pligrandigo de la E-movado, plimultigo de la studgrupoj, plimultigo de la abonantoj de „BE“.

La sukcese okazigitaj naciaj E-kursoj en Pamporovo konvinke montras tiun supreniron.

Entuziasme oni renkontis la sciigon, ke la unuaj internaciaj E-kursoj en Bulgario okazos en la somero de 1968 en Pamporovo — eterne verda perlo de Rodopi-montaro.

Kore renkontita k-do Aleksiev salutis la jubileulojn: „... CK de BEA kun aparta kontenteco montras la aktivan agadon de la esperantistoj de distrikto de Smoljan por la disvastigado de la internacia lingvo, por ĝia uzado en intereso de nia patruando, por la popularigo de la naturaj, kulturaj kaj restadlokaj rimarkindaĵoj de tiu bela regiono de socialisma Bulgario“...

En sia salutparolo k-do Sedjankov substrekis, ke „CK de BKP kaj PK de DPK deklaras sian pozitivan rilaton

al la aktiva agado de la Distrikta E-komitato kaj sian pretecon doni pli malavaran helpon“.

La E-veterano en la distrikto de Smoljan Petr Pamporov kundividis emocien sian ĝojon pro la supreniro de la movado en la naskiĝurbo.

Salutis la kunvenon reprezentantoj de la najbaraj E-distriktaj komitatoj kaj de Varna — docento Georgi Dimov, kiu transdonis modestan donacon. La prezidanto de la solena kunveno k-do Str. Spasov tralegis la telegramojn de tiuj, kiuj ne sukcesis veni.

Al la multjaraj esperantaj E-agantoj kaj al la aktivuloj de Smoljan la prezidanto de CK de BEA donis persone jubileajn atestojn.

Al la partoprenintoj en la jubilea solenaĵo oni aranĝis tagmanĝon en restoracio „Bulgario“ per kiu la dutaga celebrado finiĝis.

Estas aŭtuno. La flavaj folioj falas, la vento silentiginta kantas, forpasis la jubileaj tagoj. Sed, revenos la printempo. La folioj denove estos verdaj kaj festoj ankaŭ estos, kie mara vento nin karesos. Por indaj agoj kongresa urbo Varna patrine renkontos nin.

DK de BEA

MOZAIKO

La unua esperantisto en la regiono de Smoljan estas la instruisto el vil. Ŝiroka Lâka Vâlko Uzunov, kiu lernis Esperanton en la fino de la pasinta jarcento kaj korespondis kun D-ro Zamenhof.

Stojan Morev — librovendisto de urbo Ĉepelare estas esperantisto ek de 1906 j. kaj unua en la regiono de Smoljan estiĝis membro de UEA.

En 1910 j. kiel lernanto en Istanbul Petr Pamporov el Smoljan lernis Esperanton, kaj pli mafrue finis internacian kurson por instruantoj ĉe Andreo Ĉe. Li vizitis multajn landojn en Eŭropo kaj Japanion.



Vâlko Uzunov

Esperantista societo „Kulturo“ en Smoljan estis fondita en la aŭtuno de 1927 j. de 16 progresemaj gejunuloj inter kiuj Rajčo Daskalov, Nikola Uzunov, Vasil Dafinski, Georgi Kenov, Kalin Tošev, Boris Dorkov, Elena Bâjeva k. a.



Faksimilo de membrokarto de fondinto de la societo.



La prezidanto — fondinto de E-societo en Smoljan estas Neno Abaĝiev — oficisto en la tiama forstadministrejo. Nun li estas prezidanto de E-societo en vil. Bârzia, distrikto de Miĥajlovgrad.




La partizana estro Bratan Ŝukerov ernis Esperanton en la kurso de la igronomo Minju Edrev en 1928 j. kaj aisvolvis propagandon inter siaj kundlernantoj.



La poeto-partizano de Rodopi-montaro Kiril Maĝarov konatiĝis kun Esperanto en 1932 j. kiel lernanto en la gimnazio de Smoljan.



En 1932 j. en Smoljan Esperanto estis studata en kvar kursoj. La partoprenintoj en unu el tiuj kursoj estas montritaj sur la foto.



Neno Abaĝiev



Aktiva koresponda agado disvolvis en la pasinteco la partizano Angel Spasov. Li donis veran bildon pri la mizera stato de la loĝantoj de Rodopi-montaro al siaj korespondantoj kaj starigis fortajn ligojn kun la sovetia verkisto Jakov Vlasov.



La partizano Atanas Todorov en vil. Turjan en 1938/1939 j. okazigis kurson por studado de Esperanto inter progresemaĵ samvilaĝanoj.

Kolonelo Diĉo Petrov — ĉefo de soldata partizana bataliono, gvidis kurson de Esperanto kun soldatoj kiel estro de apudlima bariergardejo „Kon-sko“ en 1942 j.

Pri konflikto inter la polico de Smoljan kun elstaraj kontraŭfaŝistoj-esperantistoj oni skribis en revuo „Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo“ de 1935 j.

La Distrikta E-Komitato de Smoljan unuigas dek E-societojn kun kelkcentoj da organizitaj esperantistoj.

Du stratoj en urbo Smoljan estas nomitaj „Esperanto“ kaj „D-ro Zamenhof“ por celebrado de la 40-jara E-jubileo.

La Distrikta Popola Konsilantaro en Smoljan donis 1800 lv. kiel subvencio por la solenaĵo okaze de la 40-jara jubileo de E-movado en la Meza Parto de Rodopi-montaro.

SVIŜTOV. Kelkajn jarojn jam en la Supera Financa Ekonomia Instituto „D. A. Cenov“ oni lernas fakultative la internacian lingvon. Kaj kiel rezulto multaj gestudentoj el diversaj urboj kaj vilaĝoj, studentaj en nia instituto esperantistigis. Reveninte al siaj naskiĝlokoj, ili daŭrigas la propagandon de la lingvo.

Ĉi-jare ni faris grandan anticipan laboron por varbado de novaj adeptoj de Esperanto. Per du belaj tabuloj titolitaj „Lernu Esperanton — per ĝi vi konatiĝos kun la mondo“ kaj „El la vivo de SES „Aleko“, ni vekis grandan intereson inter la gestudentoj. La eksterlandaj esperantistoj Marie-Hélène Bourdier, Francio, Verner Gaidel, GDR, kaj Ĉeslav Volček, Pollando, kiuj gastis al ni dum septembro, allogis tuj la atenton de unuaj kursoj al la E-societo. Pro tio multaj novaj gekolegoj, ne

La distriktaj estraroj de Patrolanda Fronto, Sindikatoj, Komsomolo, Legeja Konsilantaro, Turista Asocio kaj BEA sendis komunan leteron de la 10-a de oktobro 1967 j. al siaj lokaj organizacioj pruvante la neceson de studado de Esperanto kaj ke oni helpu la lokajn E-societojn per disponigo de ejoj por organizo de komunaj entreprenoj, ke oni disponigu specialajn rubrikojn en la lokaj kaj distriktaj gazetoj kaj radioretoj k. a.



La Distrikta fako „Narodna Prosveta“ per letero n-ro VIII 1276 de oktobro 1967 j. al la direktoroj de la lernejoj en la Distrikto rekomendas la studordon kaj fakultativan lernadon de la Internacia lingvo, kaj helpi la lokajn E-societojn.

La materialoj estas preparitaj de DK de BEA — Smoljan.

nur inter la unua kurso, ankaŭ de la aliaj kursoj, ekvolis viziti la lecionojn de Esperanto.

Laŭ la plano de SES „Aleko“, ni organizis du ekskursojn por niaj gesocietanoj. Unu al Plovdiv, kie ni vizitis la internacian foiron kaj la alia — en Ruse, kie ni gastis al la gestudentoj-esperantistoj de VIMESS.

Ni partoprenis amase en la manifestado okaze de la 50-jaran jubileon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, portinte E-standardon kaj sloganojn. Ni esperas, ke nia granda laboro por disvastigo de nia lingvo estos fruktodona kaj ni daŭrigos nian laboron obstine kaj fervore!

Cočo Kolarov

prezidanto de SES „Aleko“



LA GEESPERANTISTOJ EN SOFIO EKSURASAS

La klubo ĉe Centra Domo de la Instruisto organizis ekskurson al Melnik, situanta en tre pitoreska regiono. Membroj de la klubo kun siaj familianoj vojaĝis per aŭtobuso, ornamita per flago kun verda stelo.


La partoprenantoj en la ekskurso trarigardis la antikvan urbon Melnik kaj Roĵen-monaĥejon. Haltante en kelkaj urboj ni kontaktiĝis kun geesperantistoj.

La E-societo „Hr. Botev“ en Sofio aranĝis du ekskursojn, kiujn partoprenis ankaŭ membroj de E-societo „M. Gorkij“ kaj gastoj el eksterlando.

La unua estis al groto „Ledenika“. Irante al la groto, ni haltis en Druĵevo. La ekskursantoj konatiĝis kun la laboro de la kurso en la tendaro, fotografiĝis kaj kantis kune kun la gekursanoj.

La groto „Ledenika“ kun siaj tre diversaj laŭ formo stalaktitoj kaj stalagmitoj kaj haloj ravis siajn vizitantojn.

Revenante, la grupo trarigardis la muzeon kaj la aliajn rimarkindaĵojn de la urbo Vraca. La gasto el Londono,



Survoje al Melnik

s-ro A. Mildwurf plenumis la peton de la ekskurso-gvidanto. La fama veterano enskribis esperante siajn impresojn en la libro de la Muzeo.

La partoprenintoj en la dua ekskurso estis ĉarmitaj de la beleco de nia grandioza Rila-montaro. La objekto de ilia vizito estis „La sep lagoj“, situantaj meze de regiono kun alpeca karaktero.

Ĝuante la belecon de nia patrolando, geesperantistoj ne forgesis ankaŭ la Esperanto-kantadon, kiu favoris bonhumoron.

L. Moralieva

RENKONTIĜO KUN LA VETERANO SIMEON PANĈEV EN VRACA

La esperantista grupo „Anne Frank“ en la Teksa teknikumo — Vraca, gvidas bone organizitan vivon. Dum 1967/1968 lernojaro k-do Daskalov instruos fakultative Esperanton en kvin kursoj kaj gvidos unu tuturban rondon por progresintoj, en kiu partoprenos gelernantoj de Teksa teknikumo por vestoj kaj dua gimnazio.

Gasto al IV kurso en instruhoro de Esperanto ĉeestis la veterano de E-movado k-do Simeon Panĉev el vil. Gorna Kremena, distrikto de Vraca. Post la leciono „En nia klasĉambro“ de k-do Daskalov, k-do Panĉev rakontis rememorojn pri la heroo vivo de iuj esperantistoj dum la malfacilaj jaroj de kontraŭfaŝisma batalo, pri la persekutoj kaj malpermeso studi Esperanton, pri la konspira studado de la lingvo. „Ju pli oni malpermesis kaj persekutis nin — diris li — des pli da adeptoj havis la esperantistoj“.

Neforgeseblaj restos la renkontiĝoj en la malliberejo kun k-do Nikola Aleksiev, nun prezidanto de CK de BEA. En la malliberejo k-do Panĉev estis bibliotekisto de la esperantista biblioteketo.

La revo de k-do Panĉev estis vidi la Grandan Sovetan landon kaj jen, li estis elektita partopreni en la oktobra manifestacio sur la Ruĝa Placo en Moskvo. Li jam informis siajn korespondantojn — esperantistojn pri sia vojaĝo kaj la nnuaj respondoj ĵus alvenis.

La lernantoj de IV kurso bondeziris al la veterano de E-movado feliĉan vojaĝon tra la lando de la konstruanta komunismo, agrablajn renkontiĝojn kun la esperantistoj kaj denove gastu al la kursanoj por rakonti siajn impresojn pri la lando de Lenin.

E. Daskalov



Okaze de la kvindekjara jubilea datpeveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, kvindek jaroj de E-agado, kvindek jaroj de la morto de D-ro L. L. Zamenhof kaj dudek kvin jaroj de la morto de la patrono de E-societo „D. Sasonov“ en Asenovgrad kune kun la Distrikta E-komitato kaj la kulturkleriga fako ĉe la urba konsilantaro la 28-an — 29-an de oktobro ni organizis solenan celebron.

La 28-an de oktobro je la 19-a horo en la granda restoracio „Moskva“, kies salono estis bone ornamita per E-flagetoj kaj aliaj propagandaj materialoj alvenis ĉirkaŭ du cent geesperantistoj kaj urbanoj. Ĉeestis multaj elstaraj gastoj, k-do Ĥristo Gorov, reprezentanto de CK de BEA, la vicurbestro k-do Ivan Markov, Boĵidar Leonov, Prezidanto de STELO, k. a. Alvenis multnombraj grupoj de geesperantistoj el Karlovo, Ĉirpan, Smoljan, Plovdiv k. a. Venis ankaŭ iuj malnovaj pioniroj de nia societo, kiel k-do Atanas Markov, Atanas Debreliev, Dimitr Pandov k. a.

La prezidanto de la societo k-do D-ro Konstantin Otonov salutis la ĉeestantojn je la nomo de la societo. Parolis ankaŭ k-do Ĥr. Gorov, kiu je la nomo de CK de BEA salutis ĉiujn ĉeestantojn kaj aparte la organizintojn de la celebrado.

Li emfazis ke en Asenovgrad oni bone organizis la 29-an kongreson de BEA en 1946 j., kaj la unuan Balkanlandan E-konferencon. Sekvis salutoj de peprezentantoj de E-societoj kaj organizaĵoj. K-do Atanas Krumov, sekretario de la Distrikta E-Komitato, k-do Ganev je la nomo de E-societo en Karlovo, k-do Peev el Ĉirpan, k-do Boĵidar Leonov je la nomo de STELO kaj BEJ kaj aliaj. Dum la vespermango ludis la

orkestro de la restoracio. Poste k-do Nedelĉo Najdenov, reprezentanto de nia societo en la festivala ĵurio en Bela Palanka disdonis la atestojn al la partoprenintoj en la E-festivalo kaj la flageton „Esperantista societo superulo“ al nia prezidanto. Sekvis parto de la programo, prezentita en la festivalo en Bela Palanka de nia junulara grupo. Sub la sonoj de la gitarmuziko oni amuzis sin kaj dancis ĝis noktmezo.

La alian tagon matene je la 10 horo, antaŭ la E-klubejo amasiĝis multaj geesperantistoj kaj gastoj, kiuj vicigitaj post la orkestro de lernejo „Ĥr. Boŝev“ ekiris al la domo de nia patrono „D. Sasonov“, kie antaŭ la ŝtona memortabulo pri la vivo kaj agado de David Sasonov parolis lia plej bona amiko kaj kunlaboranto k-do Ĥr. Gorov. En la fino de sia parolado k-do Gorov menciis ankaŭ la meritplenan E-agadon de multaj aliaj esperantistoj el Asenovgrad kiel Kirjak Buzdrov, Kr. Georgiev, Jordan Toĉev kaj aliaj kiuj jam ne estas vivaj. Sur la memortabulo estis metita florkrono je la nomo de la E-societo. Per unu minuta silento kaj



genuflekso oni esprimis eternan dankon al la mortintoj-herooj.

De tie ĉi la manifestacio daŭrigis al

a placo „D-ro L. L. Zamenhof“, kiu hodiaŭ devis esti inaŭgurita. Unue parolis pri la vivo kaj agado de D-ro Zamenhof la prezidanto de nia societo k-do Konst. Otonov. Li emfazis la meriton de Zamenhof rilate la tutmondan pacon. Post li la reprezentanto de la urbestro k-do Slavčo Kisjov en argumentita parolado substrekiis la grandan utilon de Esperanto por la homaro kaj pri la kontribuo de la geesperantistoj el Asenovgrad kiel en la pasinteco, tiel ankaŭ nun. Li menciis la nomojn de k-do D. Sasonov, Ilija Miĥajlov, Ĥr. Gorov, Genko Gjulev kaj aliaj elstaraj esperantistoj de Asenovgrad, kiuj aktive partoprenis la kontraŭfasisman batalon. Kaj nun la geesperantistoj estas inter la unuaj en la vicoj de la konstruantoj de la socialismo en

nia patrolando. Ili konigas al siaj korespondantoj la rimarkindajn atingaĵojn de nia popolo. Kaj jen pro kio la urbestro de Asenovgrad honoras la kreinton de la internacia lingvo D-ro L. L. Zamenhof kaj tiu bela placo portos inde lian nomon. Li demetis la ŝtofon el sur la ŝildo kaj gratulis la ĉeestantaron. Fine sekvis konciza literaturmuzika programo.

De tie reprezentantoj de E-societoj kunvenis en la salono de la Laboristaj Profesiaj Unuiĝoj. Oni pridiskutis multajn E-aferojn. Estis metitaj al k-do Ĥr. Gorov multaj demandoj al kiuj li respondis. Ĉiuj ĉeestantoj disigis kun renovigitaj fortoj kaj kun granda deziro eklabori pli obstine por la brila kaj sukcesplena organizo de la E-kongreso en 1968 j. en Varna.

At. Gaev

RENKONTIĜO DE GESTUDENTOJ-ESPERANTISTOJ

La 13. X. 1967 ni organizis viziton al niaj karaj geamikoj-esperantistoj en Ruse. Ni alvenis malfrue la saman tagon.

La samideanoj renkontis nin tre afable. La vesperon ni pasigis en la dolĉaĵejo de la esperantistoj. Longan tempon ni parolis pri la laboro de la societoj, pri nia estonta agado, pri la ĝojaj tagoj pasigitaj dum la internacia laborbrigado en Loveĉ.

La alian tagon ni vizitis la Ekspozicion de niaj amikoj.

Varna. Dum la somero multaj eksterlandanoj vizitas nian urbon — la perlo de la Nigra Maro. Inter ili estas multaj esperantistoj. Kara gasto de la esperantistoj en Varna estis ankaŭ s-ino Myrtle Green (prononcu Griin) el Ipswich (prononcu Ipsviĉ), Britlando. Sur la foto ŝ-ino M. Green inter la lernantinoj el la gimnazio por studado de angla lingvo Mariana G. Dimova kaj Krasimira Petrova, ambaŭ bonaj esperantistinoj, en la E-klubejo de societo „Albatro“ en Varna.

S-ino M. Green estas fervora esperantistino kaj Cseh-metoda instruistino de Esperanto. Ŝi instruas Enperanton en la gimnazioj en Ipswich kaj en aliaj urboj.

Sur la „Ponto de la amikeco“ ni renkontiĝis kaj parolis kun nia komuna amiko-esperantisto el Kenia. Posttagmeze ni estis en parko „Lipnik“. Ni ludis kaj amuziĝis, ni estis feliĉaj, ĉar ni denove estis kune.

Niaj amikoj donacis al ni emblemojn kaj ilustrita poŝtkartojn.

Ni disigis kun la espero, ke ni renkontiĝos denove, kaj ne en Ruse — sen en Sviŝtov.

Javorka Ĥristova
studentino — VFSI



S-ino Myrtle Green en Varna



La sciigo, ke oni okazigos balkanlandan E-festivalon dum la somero de 1967 jaro entuziasmigis kelkajn esperantistojn en Asenovgrad. Iri tien, sed kiel, per kio kaj kiom kostos, neniŭ sciis? Tiu ĉi demando ni pritaktis en speciala kunveno de E-societo „D. Sasonov“. Post la starigitaj kontaktoj kun la E-societo en Bela Palanka ni preskaŭ ĉion eksciis. Tiu ĉi ideo ekposedis ankaŭ iujn laboristojn kaj oficistojn, muzikemulojn kaj novajn esperantistojn en la ŝtata industria entrepreno „Brigada“ en Asenovgrad. Ili esprimis deziron aliĝi al la grupo promesante, ke ili prezentos sian programon en la festivalo. En esperantista festivalo oni devas partopreni ankaŭ per E-programo kaj fini la komencitan kurson en limigita tempo. La kursgvidanto Ŝinka Filaretova ne nur sukcesis regule gvidi la kurson kaj fini ĝin antaŭ la festivalo, ankaŭ enigis en la programon iujn E-kantojn.

Estis formita grupo de novaj kaj malnovaj, de junaj kaj maljunaj geesperantistoj ĉirkaŭ 40 personoj, kiuj decidis veturi al la festivalo per aŭtobuso, kiu estis speciale ornamita per grandliteraj sloganoj — „Per Esperanto por Mondpaco“, kiuj estis metitaj ambaŭflanke de la aŭtobuso. En la antaŭa parto, flanke de la ŝoforo estis metita la ŝildo de E-societo „David Sasonov“ — Asenovgrad. La 22-an de julio la grupo ekveturis. En Plovdiv al ni aliĝis alia aŭtobuso veturanta por la sama celo de Karlovo. De Plovdiv tra Sofio ĝis Drago man la rigardoj de la homoj estis direktitaj al niaj sloganoj.

En Bela Palanka la geesperantistoj de Asenovgrad kun gvidanto k-do Atanas Manĉev kaj vicgvidanto k-do Nedelĉo Najdenov alvenis la saman tagon je la 18 horo. La urbeto Bela Palanka estis speciale ornamita. Sur la stratoj kaj magazenvitrinoj estis metitaj sloganoj, afiŝoj kaj aliaj esperantaĵoj.

La novaĵo pri nia alveno rapide disvastiĝis tra la urbeto. Multaj homoj ĉirkaŭis niajn aŭtobusojn kaj iliaj rigardoj estis fiksitaj al la sloganoj kaj kun peno ili voĉis legi kaj diveni ĝian signifon. Baldaŭ ni estis renkontitaj de la gvidantoj de la loka esperantista movado la s-anoj Rakiĉ Najdan kaj Neŝiĉ Jovan. Ni tuj estis enloĝigitaj en la novekonstruita hotelo „Esperanto“, kiu troviĝas apud la urbeto kun admirinda panoramo. Post nia alveno la atmosfero plivigliĝis, oni pli ofte komencis aŭdi la vortojn Asenovgrad, Bulgario k. t. p. Vespere la 22-an de julio laŭ peto de s-no Smolĉ Drago en la restoracio apud la somera teatro ni prezentis muzikdancan amuzadon kaj ni gajnis la publikon. La alian tagon komenciĝis la festivalo. Ĉiu kolektivo de-

vis prezenti sian programon. Nia kolektivo partoprenis per tri grupoj: Popolkanta ensemblo, estrada kaj Mandolina ensemblo. Frumatene post la ĝenerala provludo de la muzikistoj, ni vizitis la ekspozicion en la urbo. Pro malfruigo de la aliaj kolektivoj el Francio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj unue prezentis sian programon nia kaj la lokaj kolektivoj. La somera teatro estis plenplena. La publiko renkontis nian kolektivon per ovacioj kaj fortaj aplaŭdoj. La ĵurio de la festivalo post ĉiu muzika numero donis plej altan pritakson. La unuaj impresoj estis belegaj. Altan pritakson ricevis preskaŭ ĉiuj niaj partoprenintoj. Sed necese estis, ke oni aŭdu dum la venonta tago ankaŭ la ceterajn kolektivojn kaj tiam konkludi ĉu ni vere estis la plej bonaj?

Bedaŭrinde la venontan tagon nia grupo devis daŭrigi sian vojaĝon al Skopje kaj ni ne havis eblecon resti ĝis la fino de la festivalo kaj aŭdi la rezultojn laŭ la klasifiko. Tion ĉi ni lasis al la ĵurio mem, kiu devis sciigi al ni per letere la rezulton.

La 24-an de julio matene antaŭ nia ekiro de Bela Palanka la urbestro invitis nin en sia kabineto, kie ni havis la okazon interŝanĝi niajn impresojn pri la festivalo. Li speciale substrekis kaj donis altan pritakson pri nia kolektivo kaj bondeziris al ni pli grandajn sukcesojn. Je la nomo de nia societo mi dankis al la urbestro. Mi ankaŭ salutis la lokan E-societon „D-ro L. L. Zamenhof“ pri ilia bona iniciato kaj la loĝantaron pri nia varma akcepto. Mi esprimis mian impreson pri la organizo de la festivalo kaj bondeziris ankoraŭ pli brilajn sukcesojn. K-do Nedelĉo Najdenov, unu el la gvidantoj de nia kolektivo, invitis ilin gasten en Asenovgrad. Liajn vortojn oni akceptis per fortaj aplaŭdoj. Parolis ankaŭ la sekretario de la loka E-societo k-do Najdan Rakiĉ, kiu donis altan pritakson de nia kolektivo. Parolis la reprezentanto de la distrikta E estraro en Niŝ, kaj aliaj. La sekretario de la loka E-societo donacis al ĉiuj ĉeestintoj malgrandajn donacojn kiel memoraĵo de la festivalo, poste ni ĉiuj estis invitataj de la urbestro en restoracion „Remiziana“ al lunĉo, kiu daŭris pli ol unu horo. En siaj eldiroj li bondeziris al ni, ke ankaŭ estonte inter niaj du urboj okazu reciprokaj gastadoj k. a. En urbo Niŝ ni restis nur unu horon kie kune kun Karlovanoj, kiuj nin atendis ĉi tie, ekiris al Skopje.

En Skopje ni alvenis la 24-an de julio. La venontan tagon en la saman hotelon alvenis ankaŭ grupo da gejunuloj el Francio. Dum la vespero en la hotelaj klubejo ni aranĝis dancamuzon al kiu aliĝis ankaŭ la francaj gejunuloj. Kreiĝis senĝena kaj amikeca atmosfero, kaj sub la ritmo de la muziko ni ludis kaj

amuziĝis ĝis malfrue. La francoj kantis siajn naciajn popol-kantojn kaj ni bulgarajn kaj esperantajn.

La 26-an de julio frumatene ni ekiris re-
turne al Asenovgrad. Kiam nia aŭtobuso hal-
tis en Kumanovo, pertelefone ni ligiĝis kun
la gvidantoj de E-societo en Bela Palanka, de
kie oni sciigis al mi, ke societo „D. Sasonov“
estas klasifikita de la ĵurio je la unua loko
kaj ke post nelonge ni ricevos flageton kaj
atestojn por la apartaj partoprenintoj. Nia ĝojo
estis nepriskribebla. La entuziasmo estis granda.
Niaj fortostreĉoj ne estis vanaj. Ni ĉiuj prome-

sis, ke porestante ni klopodos ekposedi bon-
la lingvon kaj plibonigi nian programon, kun
espero, ke venontjaron ni iros pli malproksi-
men. Sed tio postulas pri seriozan preparadon.

Post monato ni ricevis la flageton kaj la
atestojn. Nun flageto jam flirtas en nia klu-
bejo, kaj post nelonge ni festos solene ĝian
oficialan ricevon kaj la disdonon de la ate-
stoj. Profunde en niaj koroj restos poreterne
neforgeseblaj la momentoj de la festivalo.

Gvidanto de la grupo:

Atanas Mančev

„Gloron al Oktobro!“ ni legas sur
la slogano, kiun portas la gelernantoj
de la esperantista grupo „Verda ra-
keto“ — II-a gimnazio en Vraca kun
kursgvidanto Bojčo Mladenov. Pli ol
100 entuziasmaj geesperantistoj mani-
festaciis antaŭ la tribuno kun la oficia-
laj personoj.

Teksto kaj foto: *E. Daskalov*

AJTOS. Jam estiĝis tradicio, ke en nia
urbo ĉiujare oni malfermas kurson de Espe-
ranto.

Ĉi-jare laŭ iniciato de E-societo „Ondo“ oni
malfermis la kurson je 4. X. 1967 j.

La kurson malfermis la prezidanto de la so-
cieto k-do Kalčo Paspalev. Li faris malgran-
dan raporton antaŭ la gekursanoj pri la sig-
nifo de la internacia lingvo, post kio la kurs-
gvidanto k-do Georgi Lazarov instruis la unuan
lecionon.

En la kurso partoprenas 20 gekursanoj pre-
cipe gelernantoj, kaj ĉiuj entuziasme lern-
as la lingvon.

G. Lazarov

ANEKDOTO

Staras geedzoj antaŭ bedo kun be-
laj kaj aromaj floroj.

La edzo diras: — Kiom aromaj, sed
ne belaj floroj!

La edzino: — Male! Tre belaj ili
estas, sed ne aromaj.

Li estis miopa, kaj ŝi havis nazka-
taron.

(El „Lernolibro de Esperanto“ de
Zora Mladenova Hans kaj Georgi
Hr. Dimov).

ŜUMEN. Malmulte da tagoj restas ĝis la
celebrado de la du brilaj kaj rimarkindaj dat-
revenoj — 80 j-roj de la kreado de Espe-
ranto kaj 60 jaroj de la fondiĝo de BEA. Por
ilia inda renkonto kaj festado aktive laboras
la esperantistoj-membroj de unu el la unuaj
E-societoj en nia lando — „Vekiĝo“. En la plano
de la societo por la kvara trimonato estas an-
taŭviditaj diversaj aranĝoj konekse kun
la celebrado. Jam komencis sian laboron ron-
deto pri studado de la societa historio. Ĝia
gvidanto estas unu el niaj plej malnovaj kaj
multjaraj esperantistoj K. Bogutinski, kiu ĉi-
jare finis la verkadon de la detala societa hi-
storio. Kun granda intereso oni renkontis la
ciklon de rememoroj de multjaraj esperantistoj
„Kiel mi fariĝis esperantisto kaj interesaj oka-
zaĵoj en mia E-agado.“ La unua, kiu rakontis
rememorojn, estis k-do At. Bojaĝiev, prezi-
danto de la societo. Li rakontis siajn kontak-
tojn kun progresmaj geesperantistoj el aliaj
landoj jam en la jaroj 1924—30, pri la granda
amikeco kaj korespondado kun geesperantistoj
el la Granda Sovet-Lando. Oni decidis ankaŭ
dum decembro esti aranĝita per la urba radio-
centro disaŭdigo, kaj la 15-an de decembro
esti aranĝita jubilea solenaĵo, kie post la
raporto estos honoritaj per donacoj la plej
malnovaj kaj aktivaj geesperantistoj.

Cv. Todorov



Honore al 50-jara datreveno de la Glora Oktobra Socialisma Revolucio la Distrikta Komitato de la esperantistoj en Haskovo organizis en vil. Meričleri esperantistan renkontiĝon. En la renkontiĝo partoprenis esperantistoj, la plimulto el kiuj estis junuloj el Svilengrad, Dimitrovgrad vil. Radievo, vil. Meričleri kaj Haskovo.

La sekretario de E-societo en vil. Meričleri Tončo Lozev malfermis la kunvenon kaj donis la parolon al la prezidanto de la Distrikta Komitato k-do Idakiev, kiu salutis la partoprenintojn.

En sia eldiro k-do Idakiev rakontis pri la agado de la junulara sekcio ĉe la societo „Asen Zlatarov“ en Haskovo. Pri la sperto de la plej granda societo en la distrikto „Internacia amikeco“ en Dimitrovgrad pri la organizado de renkontiĝoj kaj korespondado kun eksterlandaj esperantistoj rakontis la vicprezidanto de la societo Ĵeko Zaprianov.

La juna esperantistino Dobrinka Petkova el Dimitrovgrad rakontis siajn impresojn pri la seminario en Seged, Hungario, en kiu ŝi partoprenis antaŭ ne delonge. Post tio la veterano de E-movado en Dimitrovgrad Vladi Vâlčev rakontis siajn impresojn pri la lastaj renkontiĝoj kun esperantistoj el Rumanio, Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj GDR.

Post la kunveno en unu el la salonoj de la Kultura Domo la ĉeestintaj esperantistoj en la renkontiĝo amuziĝis, kantis kaj dancis. Oni vizitis unu el la minejoj de la Ŝtata Mineja Entrepreno „Marbas“ kaj la rimarkindaĵojn de la vilaĝo.

La renkontiĝo en vil. Meričleri helpis por la bona interkonatiĝo de la esperantistoj kaj por interŝanĝo de sperto.

Pro tio la Distrikta Komitato antaŭvidas ankaŭ aliajn similajn renkontiĝojn.

J. Zaprianov

IV INTERNACIA ESPERANTISTA FERIO 17—30. IX. 1968 — MIEDZYGORZE—POLLANDO

Post grandega sukceso de III IEF, kiun partoprenis 450 geesperantistoj el 15 landoj (interalie el Novzelando, Usono kaj Japanio) de 17 ĝis 30 de septembro 1968 en Miedzygorze okazos IV Internacia Esperantista Ferio. La Ferion organizas FERIA FAKO de Polaj Sindikatoj kaj Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio.

La programo antaŭvidas jenajn entreprenojn: interkona vespero, balo, konsultaj horoj pri lingvaj problemoj, ekskursoj, dancamuzoj, vespero ĉe fajrero, vesperoj de l' amikeco, projekciado de esperantaj sonfilmoj, lernado de esperantlingvaj kanzonoj k. a. Dum la Ferio poŝtoŝtampilo uzos specialan poŝtstampilon.

La Ferion oni povas partopreni nur por du ŝemajnoj. Partoprenkotizo estas 36 levoj. La

partoprenkotizo ampleksas la tuttagan manĝadon, tranoktadon en 3, 4 aŭ 5 personaj ĉambroj kaj aliajn programerojn. Por la geedzaroj estas rezervitaj 30 dupersonaj ĉambroj. Personoj el la landoj el kiuj ne elblas transsendi monon povas reguligi partoprenkotizon surloke en Miedzygorze tuj post la alveno.

Esperantistoj el socialismaj landoj ne bezonas polajn vizojn por veni al Pollando.

Prospektojn kaj informamaterialojn pri Malsupra Silezio, Wroclaw kaj Pollando petu de Centro de Tarisma informado pri Malsupra Silezio, Wroclaw, str. Kollataja 31/1, Pollando.

Detalaj informoj pri la Ferio, aliĝiloj kaj invitiloj estas riceveblaj de: *Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, Wroclaw-17, Poŝtkesto 8, str. Dubois 3, Pollando.*

KONGRESO DE UNUIGINTAJ URBOJ ĈE UNESKO

De la 12-a ĝis la 15-a de septembro okazis en la Domo de Unesko en Parizo la sesa kongreso de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Urboj, kun la temo „Ĝemeligo kaj interurba kunlaboro servas al la paco“. La Organizaĵo havas

kontaktojn kun urboj en pli ol 60 landoj. De post ĝia fondo en 1957, okazis jam pli ol 700 ĝemeligoj peritaj de Unuiĝintaj Urboj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ GASTIS AL NI

Gastoj al la geesperantistoj en Svisĉov estis la germ na esperantisto ing. Verner Gaidel el Leipzig kaj la pola esperantisto Ĉeslav Volĉek el Sosnovec. Ĉeslav Volĉek estas aktiva turistoj kaj li utiligas la jaron de la internacia turismo kaj elektis nian landon por sia turista objekto. Li intencas viziti ĉiujn 100 turistajn objektojn kaj ricevi la oran turistan insignon de Bulgara Turista Asocio.

Niaj gastoj vizitis la vidindaĵojn de la urbo. Al ili faris grandan impreson la preĝejo konstruita de la konata majstro-konstruanto Koljo Fiĉeto.

VILAĜO PAVEL BANJA, DISTRIKTO DE STARA ZAGORA. En la fino de l' pasinta jaro ĉe la lernejo „Hristo Botev“ estis organizita E-kurso, en kiu partoprenis 25 gelernantoj de VI klaso kaj unu instruistino. La kurso daŭris ĝis majo p. j. Niaj gelernantoj-esperantistoj preparis programon por la VIII Junulara Esperantista Festivalo, kie ili estis pre-

Vespere je la 19-a de septembro ili havis renkontiĝon kun geesperantistoj de la studenta E-societo „Aleko“, ĉe VFSI. Ing. Gaidel prelegis pri E-movado, kulturo kaj ekonomio de GDR kaj Ĉ. Volĉek pri siaj impresoj el Japanio, kiun li vizitis antaŭ du jaroj, okaze de la Jubilea 50-a Universala Esperanto-kongreso en Tokio. Li parolis ankaŭ pri la sincera bulgara gastameco kaj substrekis, ke multaj geesperantistoj el nia lando helpis lin por la vizitado de la turistaj objektoj.

C. K.

miitaj. Post tio ni havis renkontiĝon kun niaj gastoj-esperantistoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio. Antaŭ ili ni prezentis riĉan programon. Dum 1967/1968 lernojaro, dank' al la helpo de la estraro de nia lernejo, precipe de la direktoro kaj vicedirektoro nia laboro daŭras. Nun la kurso nombras 20 gelernantojn de VII klaso kaj 2 instruistinojn.

Hr. Rastev

AKTIVECO DE LA TURISTOJ-ESPERANTISTOJ EN SOFIO

Nova Turista kaj Esperantista Fajrujo

La estraro de la Turista Sekcio „Esperanto“ luis kancelarion sur strato „Ljuben Karavelov“ 2. Ĝi troviĝas apud la Zoologia ĝardeno. En la kancelario oni povas pagi membrokotizon, liti por dormado en la montodomo de la sekcio, aliĝi al la aranĝataj enlandaj kaj eksterlandaj ekskursoj k. a.

Nia plej nova kaj tre utila iniciato estas la kompilado de adresaro kaj pretigo de kartoteko de la turistoj-esperantistoj, kiuj deĵoras en oficejoj, bankoj, restoracioj, magazenoj k. a., kaj havas kontakton kun la publiko aŭ ili estas pretaj gastigi en sia loĝejo bulgaran aŭ eksterlandan esperantiston. La adresaro kaj la kartoteko devas esti pretaj ĝis la komenco de la so-

mero 1968. Tio certe estos tre utila kaj praktika por la esperantistoj kiuj vizitas la bulgaran ĉefurbon.

Kunlaborado kun Departemento „Arbaraj Parkoj“

La Komunuma Departemento „Arbaraj Parkoj“ plibonigis la vojeton inter Montodomoj „Esperanto“ kaj „Molina Skala“. Ĝi estas longa unu kilometron. Nun oni planis kaj pretigis la dokumentaron por plibonigo kaj plibeligo de la vojo al Montodomo „Kamen Dial“ — longa 650 metrojn. La sumo kiun oni elspezos por tiu laboro estas 6,100 levoj (pli ol 3,000 Us dolaroj). Tiuj laboroj estas antaŭviditaj en la kontrakto pri interhelpo subskribita de la Departemento kaj de la Turista Sekcio „Esperanto“.



Dank' al la intensaj kontaktoj inter la Prezidanto de la Turista Sekcio „Esperanto“ kaj la gvidantoj de la Turista Oficejo „Pirin“ ĉe Bulgara Turista Asocio jam la Turisma Oficejo „Pirin“ utiligas Esperanton. Oni korespondas en la internacia lingvo, disponigos materialojn por aranĝo de kunvenoj dediĉitaj al Bulgario kaj ties naturo, organizos feriojn de esperantistoj el eksterlando en Bulgario kaj

havigos por siaj celoj ĉiĉeronojn-esperantistojn. Oni petis nin disponigi al ili kvin turistojn, kiuj bone parolas Esperanton por sekvi la baldaŭ malfermotan kurson por ĉiĉeronoj.

Eksterlandanoj, kiuj intencas ferii en Bulgario, povas ricevi informojn de Turisma Oficejo „Pirin“, placo „Lenin“ 8, Sofio, Bulgario.

Nikolaj Nikolov
fakdelegito pri turismo kaj sporto

ОКРЪЖЕН КОМИТЕТ НА ОТЕЧЕСТВЕНИЯ ФРОНТ, ОКРЪЖЕН СЪВЕТ НА ПРОФСЪЮЗИТЕ, ОКРЪЖЕН КОМИТЕТ НА КОМСОМОЛА, ОКРЪЖЕН ЧИТАЛИЩЕН СЪВЕТ, ОКР. СЪВЕТ НА БЪЛГ. ТУРИСТИЧЕСКИ СЪЮЗ, ОКР. КОМИТЕТ НА БЪЛГ. ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

гр. Смолян, 10 октомври 1967 г.

ОТНОСНО: Подпомагане есперантските дружества в окръга

Съвременните международни врѝзки и широкият културен и стопански обмен на нашата страна с други държави, както и ускореното изграждане на среднородопските курорти и за нуждите на Международния туризъм налагат необходимостта да се изучават в училищата, в кръжоци и по самостоятелен път най-различни чужди езици.

Между тези възможности изучаването на международния език ЕСПЕРАНТО е едно благоприятно и полезно мероприятие. Езикът есперанто има много опростена граматика, богат речников фонд и логическо устройство на фразата, които ги правят лесно усвоими. Благодарение на тези си качества много езиковеди и държавници са изразили своето положително и благоприятно отношение към този език и препоръчват неговото изучаване. Във всички страни на света есперанто се изучава и ползува. У нас също се изучава в много училища, като в Софийския държавен университет има открита катедра, а в цялата страна стотици есперантски дружества ежегодно организират курсове за изучаване на международния език.

Лесното усвояване на есперанто дава прекрасна възможност на голяма част от учащите се да го ползуват в своите кореспондентски врѝзки с най-различни народи и така посредством интимната размяна на мисли се постига най-резултатно пропагандиране на природните красоти и социалистически преобразования в обновената ни Родина и се

ДО

съдействува за тяхното комунистическо възпитание.

Есперантистите и привържениците на есперанто в Смолянски окръг през този месец по тържествен начин ще отпразнуват своя 40-годишен юбилей. Делото на 16-те смолянци от 1927 год. със създаването на първото есперантско дружество в града и окръга днес е полето одесет дружества и няколко стотици организирани есперантисти и есперантиски, които с всяка измината година регистрират обнадеждаващи резултати.

За да постигне по-голям размах есперантското движение в окръга е наложително есперантските дружества по места да бъдат дейно подпомагачи. Да се проведе разяснителна работа сред членовете на отделните масови организации за изучаването на есперанто. Да се предоставят на есперантските дружества помещения за провеждане на курсове, за събрания, за уреждане на изложби и пр. Съвместно да се организират мероприятия — забави, балове, излети, посрещане на чужденци и други. По-добре да се използват местните многотиражки и радиоуредби за пропагандиране на международния език есперанто — език на мира и дружбата между народите

ОК НА ОТЕЧ. ФРОНТ: Д. Николов
ОС НА ПРОФСЪЮЗИТЕ: Ст. Тунев
ОК НА ДКМС: Д. Пеев
ОКР. ЧИТАЛ. СЪВЕТ: Р. Даскалов
ОС НА БТС: С. Кашев
ОК НА БЕС: Й. Йорданов



IX BALTLANDA ESPERANTO-TENDARO

EN URBO VILNIUS 1—10. VIII. 1967

La IX BET, organizita omaĝe al 50-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio prezentas grandan eventon en soveta esperantista movado. Kvankam tradicia laŭ sia titolo kaj vicnumero, ĝi akiris tute novan aspekton kompare kun la estintaj tendaroj. Anstataŭ en provinco ĝi okazis en la ĉefurbo de Soveta Litovio, anstataŭ tendoj kaj provincaj lernejoj ĝi havis ejon en unu el la plej imponaj kulturpalacoj de la respubliko. Unuan fojon en la sovetlandaj Esperanto-tendaroj ni renkontiĝis kun granda nombro da eksterlandaj geesperantistoj. Laŭ nombro de partoprenintoj ĝi estas ankaŭ la plej impona el ĉiuj okazintaj sovetlandaj tendaroj. En ĝi partoprenis 432 personoj: 101 eksterlandanoj kaj 331 sovetianoj, ne inkluzivante kelkdekojn da gastoj, venintaj por kelkaj tagoj, kaj vilnanojn, vizitintajn la aranĝojn de la tendaro nur epizode.

La tendaron oficiale salutis reprezentantoj de registaraj, sociaj kaj sciencaj organizaĵoj, pri ĝi vaste informis gazetaro (nur en vilnusiaj gazetoj ni kalkulis 14 raportojn) kaj radio (12-foje). Ni ne dubas, ke la IX BET havos grandan influon por esperantista movado ne nur en Litovio, sed ankaŭ en la tuta Sovetlando.

Je dispono al la tendaranoj estis ĉiuj koncertaj, dancaj kaj aliaj salonoj de la grandega Respublika Kulturpalaco de Profesiaj Unuiĝoj (Sindikatoj). Al nia laboro multe helpis direktoro de la palaco H. Barauskas, kiu interalie, dum la litova arta programo kantis kelkajn popolkantojn per sia sukoza baritono. La tendaranoj loĝis en moderna studenta hejmo en pitoreska parto de la urbo, apud monteta kaj arbara tereno, proksime de rivero Neris.

Prezidanto de la prepara komisiono A. Poška kun helpo de kelkaj aliaj vil-

nusiaj esperantistoj trovis simplan kaj malmultekostan vojon de invito kaj restado de eksterlandanoj. Ne al ĉiuj eksterlandaj amikoj tiu invito helpis atingi nian tendaron, sed tamen ni povis bonvenigi konsiderindan nombron, nome: 71 el Hungario, 15 el Pollando, 8 el Bulgario, 4 el Jugos'avio, 2 el Germana DR, 1 el Finnlando.

La tendara programo enhavis tradiciajn punktojn pri prelegoj de somera, universitato, libera tribuno, organizaĵoj, sekcia laboro, arta agado, oratora konkurso, kursoj de la lingvo, ekskursoj tra la urbo kaj ekster la urbo (al la Verdaj Lagoj, al la antikva litova ĉefurbo Trakai, al la plaĝo Valakampiai).

En la somera universitato estis tralegitaj entute 25 prelegoj, plejparte (16) pri esperantologiaj temoj. Parto de prelegoj estis destinita al historiaj demandoj lige kun la 50-jara jubileo de la soveta sociordo. Precipe ni devas mencii la kolektivajn prelegojn pri esperantistoj en la revolucia movado. Ni nur bedaŭras, ke la promesitaj kontribuoj de niaj eksterlandaj amikoj laŭ tiu temo ne estis efektivigitaj. Nur malgrandan parton de la universitata programo okupis sciencopopularaj prelegoj.

En la libera tribuno kaj la speciale antaŭviditaj kunvenoj estis pritraktitaj organizaĵoj kaj movadaj demandoj. En la multaj sekcioj, antaŭviditaj en la programo, kunsidojn havis la medicina, pedagoga, tradukista, literatura.

Ni esprimas sinceran dankon an niaj hungaraj amikoj, precipe al la gvidantoj de Esperanto-klubo en Debrecen s-anoj L. Toth kaj D. Szilagyi, kiuj organizis ne nur tiel multnombrian venon de ĝiaj anoj, sed ankaŭ tre altnivelan artan programon. La tendaranojn ĝojigis per siaj artaj vesperoj ankaŭ



latvaj, estonaj kaj litovaj geesperantistoj. Bedaŭrinde la antaŭviditaj artaj vesperoj de aliaj nacioj ne okazis.

En oratora konkurso laŭ la temo „Problemo de patroj kaj filoj en Esperantio“ partoprenis 12 personoj, inter ili 3 eksterlandanoj (W. Włodarczik el Pollando, Flora Szabo kaj s-ro Hlavathy el Hungario). Unua loko estis aljuĝita al s-ro W. Włodarczik (Varsovio), la dua — al J. Tamošiūnas (Vilnius), la tria — al J. Ojalo (Tallin, Estonio), la kvara — al L. Sobanskij Šalčininkai, Litovio).

Dum la tendaraj tagoj en la Respublika Biblioteko funkciis riĉa ekspozicio de Esperanto-literaturo. Ĝin vizitis pli ol 1500 personoj. Por ĝia aranĝo multe kaj sincere laboris s-ano J. Petrulis. Oni povis vidi tie multajn rarajn eldonaĵojn, ekz. unuajn lernolibrojn por ru-

soj kaj poloj (Varsovio, 1887), unuan lernolibron por litovoj (eldonitan en Germanio en 1890 j. dum malpermeso de litova presado en Litovio), la Fundamentan Krestomation kun aŭtografo de L. L. Zamenhof k. a.

Ni esperas, ke la novaĵo — partopreno de eksterlandaj amikoj — komencita en ĉi tiu tendaro, fariĝos tradicio. Ni transdonis la stafeton por aranĝi la X BET al niaj amikoj en Latvio.

La tendaro komenciĝis per interkona vespero kaj finiĝis per adiaŭa balo, dum kiuj ludis orkestro de la Respublika Kulturpalaco. Entute la tendaro laŭ programo kaj laŭ ekstera aspekto tre similis al niaj universalaj kongresoj.

La tendaranoj akceptis specialan rezolucion.

A. Vaitilavičius
membro de la prepara komisiono

REZOLUCIO

Dum la IX Baltlanda Esperanto-Tendaro kun partopreno de esperantistoj el Sovetunio, Bulgario, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, entute 430 personoj, el kiuj 99 alilandanoj — estis organizitaj multaj kulturaj, klerigaj kaj distraĵaj aranĝoj.

Dank' al la gastamo kaj granda laboro de la litovaj kamaradoj la partoprenintoj havis eblecon pli proksime konatiĝi kun la laborema litova popolo kaj ĝia bela lando. Ni pridiskutis nuntempajn problemojn de E-movado kaj la partopreno en la tutmonda batalo por paco kaj interpopola amikeco.

Ni kondamnas la usonan agreson

kontraŭ vjetnama popolo kaj israelan invadon en arabajn landojn.

Ni alvokas ĉiujn esperantistojn de la mondo aktive partopreni en la agado de la pachtalantoj kontraŭ la agreso kaj por firmigo de la paco.

Okaze de la 50-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio ni streĉu niajn fortojn por plua disvastigo de Esperanto.

Ni esprimas nian dankon al la ŝtataj, partiaj kaj sindikataj instancoj de Litovio por la helpo pri sukcesa laboro de la tendaro.

Vilnius, la 10-an de aŭgusto 1967

De la 11-a ĝis la 17-a de Majo 1968 en Varna okazos la XX-a Jubilea kongreso de IFEF. De la 19-a ĝis la 21-a de majo 1968 en Varna okazos la 37-a kongreso de BEA. Petu informojn kaj aliĝilojn de BEA.

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Dimitr ĴDRAKOV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉef-redaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV, Kunĉo VÁLEV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 83-26-82

En ĵ. „Septemvri“ — Stara Zagora (de 24. VI. 1967) en la artikolo „Ĉu mi estas prava?“ de Ivan Ĥaĝijski la aŭtore mencias Esperanton.

En ĵ. „Rodopski Ustrem“ — Smoljan (de 11. VII. 1967) artikolo de Strašimir Spasov „Nacia kurso de Esperanto“ — pri malfermo de kurso por komencantoj en Pamporovo.

En la sama ĵurnalo (de 12. X. 1967) — longa artikolo de Jordan Jordanov — „40 jarojn Esperantista Movado en la distrikto de Smoljan“.

En ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ — (de 5. VIII. 1967) — en artikolo de N. Abaĝieva — „La infanoj de Hiroŝima alvokas“ — la aŭtorino rakontas pri iu libreto en Esperanto, rilatanta la bombadon de Hiroŝima.

En ĵ. „Veĉerni Novini“ (de 21. IX. 1967) — informo — „Distingo de bulgara esperantisto“ — oni rakontas pri la elekto de la bulgara esperantisto At. D. Atanasov kiel vicprezidanto de Akademio de Esperanto kaj ke alia akademiano estas Prof. D-ro St. Ĝuĝev.

En la sama ĵurnalo (de 7. X. 1967) — sciigo en la kroniko, ke la Centra Domo de la Instruisto en Sofio organizas kurson de Esperanto kaj aliaj lingvoj por instruistoj.

En ĵ. „Zagorsko Zname“ — Nova Zagora (de 22. IX. 1967) informo „Esperanto — lingvo por ĉiuj“, en kiu oni sciigas, ke estas malfermata kurso de Esperanto.

En ĵ. „Narodno Delo“ — Varna (de 10. X. 1967) — sciigo en la kroniko, ke okazos solena kunveno konekse kun la Glora Oktobra

Revolucio en la klubejo de E-societo la 10-an de oktobro 1967.

En ĵ. „Ŝumenska Zarja“ (de 21. X. 1967) — informo de Cvjatko Todorov „Esperantan saluton“, en kiu la aŭtoro sciigas ke konekse kun la duonjarcenta jubileo de la Granda Oktobra Revolucio la esperantistoj el Ŝumen sendis pli ol 100 gratulleterojn al la esperantistoj en Sovetunio.

En la ĉiusemajna eldono „Unu semajno en Sofio“, (de 21—27. VIII. 1967) oni rakontas pri la agado de „Vsestranni Uslugi“, kiu tradukas dokumentojn en ĉiujn eŭropajn lingvojn, inkluzive Esperanton.

En revuo „Filatelen Pregled“, Sofio (n-ro 9 de septembro 1967) en fako „Kuriozaj faktoj“ oni rakontas pri la poŝtmarko, aperinta en rusa lingvo kaj Esperanto en aŭgusto 1926 en Leningrad okaze de la VI kongreso de la proletoj-esperantistoj.

Es revuo „Kartinna Galeria“ — Sofio (n-ro 6/1966) en la artikolo „Muzika lingvo“ oni mencias Esperanton.

En ĵ. „Septemvrijsko Zname“ — Kneja (de 24. X. 1967) — informo de Boris Gorniŝki — „Gasto al niaj esperantistoj“. La aŭtoro rakontas pri la gastado en Kneja de la pola esperantisto Ĉeslav Volĉek el Sosnovec.

En ĵ. „Veĉerni Novini“ (de 1. XI. 1967) — sciigo en la kroniko pri tuturba E-kunveno dediĉita al la Granda Oktobro.

En la sama ĵurnalo anonco de „Vsestranni Uslugi“ pri kursoj de Esperanto.

En ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ (de 2. XI. 1967) en la artikolo „La kvar danĝeraj literoj“ la aŭtoro K. Ĉiĉanov mencias la esperantan konspiron en Plovdiv antaŭ la Naŭa de Septembro 1944.

KATALOGO DE UNESKO-TRADUKOJ

Pli ol 200 titoloj aperas en la dulingva (angla-franca) katalogo, kiun ĵus eldonis Unesko sub la titoloj „Programme Unesco de traductions d'oeuvres littéraires“ / „Unesco literature translations programme“. Temas pri katalogo de tradukoj en kvin ĉefajn lingvojn — la araba, angla, franca, persa kaj hispana — eldonitaj aŭ sub aŭspicio de Unesko aŭ laŭ kontrakto kun tiu organizaĵo. La originaloj devenas el 60 diversaj literaturoj, proksimume 40 orientaj kaj 20 eŭropaj lingvoj.

La katalogo estas senpage ricevebla de la Departemento de Kulturo, Unesko, Place de Fontenoy, F-75-Paris (7e), Francio. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

RAJTOJ DE LINGVAJ MALPLIMULTOJ

Pli ol 40 delegitoj de 17 landoj partoprenis la Eŭropan Konferencon pri Lingvaj Malplimultoj, kiu okazis en Oslo dum aŭgusto. Inter la nacimalplimultaj lingvoj reprezentitaj estis la bretona, la lapona, la makedona kaj la kimra.

En sia inaŭgura parolado s-ro Kjell Bondekik, la norvega Ministro pri Ekleziaj aferoj kaj Edukado, diris, ke ne sufiĉas nur toleri lingvajn malplimultojn, sed necesas doni al ili juran rajton je respekto. Alia parolanto, prof. Magne Oftedal, atentigis, ke la amaskomunikiloj kaj la hodiaŭa distraja industrio minacas eĉ ba ekziston mem de la lingvaj malplimultoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

ANEKDOTO

- Kial vi ploras, knabeto?
- Mia onklino falis sur la ŝtuparon.
- Kaj vi ploras, ĉar ŝi vundis sin?
- Ne, sed ŝi poste batis min, ĉar

mi ridis.

(El „Lernolibro de Esperanto“ de Zora Mladenova Hans kaj Geogi Ĥr. Dimov).